

# **La Amo de Fraŭlino Cui Yingying**

**莺莺传**

**Yuan Zhen ( 779 - 831 )**

**Guozhu tradukis**

**(世汉对照)**

**e-Librigita de Elerno**

**Aŭg. 2008**



## Rimportreto pri Yingying

Yingying — fraŭlino delikata,  
ribel' de nobla familio,  
venkis heziton per pasio,  
dediĉis sin al la amata,

sed poste ŝia ag' sensvata  
ne havis jeson de l'socio.

Yingying — fraŭlino delikata,  
ribel' de nobla familio,

Pro l' perfidulo senkompata  
ĉio fermiĝis tragedio  
fama kaj en Tang dinastio  
kaj ĝis nun ankaŭ vastkonata.

Yingying — fraŭlino delikata.

莺莺小姐，叛逆女性。犹豫不决，爱情战胜。  
无媒婚姻，社会不允。莺莺小姐，叛逆女性。  
悲剧结尾，男子负心。唐代至今，久负盛名。  
莺莺小姐，叛逆女性。

# La Amo de Fraŭlino Cui Yingying

## Yuan Zhen (779-831)

Dum Zhenyuan-erao (785 - 805) de Tang-dinastio, vivis instruitulo Zhang — jen milda kaj bela junulo, kun firma volo kaj malsocietema karaktero, li sin tenis kontraŭ ĉio malkonforma al etiketa deco. Okaze de ekskurso aŭ festeno kun amikoj, dum la ceteraj ĉeestantoj senĉese bruante konkuris por pavi, instruitulo Zhang restis ĉiam kvieta, akomodigema kaj neniam malbonkondata. Tial, kvankam li jam aĝis 23-jara, tamen ankoraŭ havis nenian amaĵon kun virino. Amikoj demandis al li pri la kialo, kaj Zhang respondis humile: “Oni prenis s-ron Dengtuzi por tipo de amoristo, tamen li fakte ne meritas la famon, ĉar li estis nur ĝuama. Dume mi mem estas vera amanto de amoro, sed ankoraŭ neniu taŭga trafis min. Kia diro ? Ĉar ĉiun, kiu plaĉas per beleco, mi ja konservis en mia koro, tial ne misopiniu min izolito de amo.” La demandinto sekve komprenis lin.

Post nelonge, instruitulo Zhang vojaĝis al Puzhou. Oriente je dekkelkaj lioj de Puzhou troviĝis budaisma bonzejo nomata Pujiu-templo. Instruitulo Zhang do loĝis tie en la templo.

Okaze vidvino-sinJORINO el familio Cui, dum sia revena vojaĝo al la ĉefurbo Chang'an, veturis preter Puzhou, ankaŭ portempe loĝis en la sama templo. S-ino Cui estis filino de familio Zheng, kaj la patrino de instruitulo Zhang ankaŭ estis unu el filinoj de la sama familio Zheng, tial, kalkulate laŭ geneologia arbo, s-ino Cui estis onklino de instruitulo Zhang el nesama branĉo.

Tiujare, la armeestro Hun Zhen mortis en Puzhou. Pro mallerta rego far la armea inspektoro eŭnuko Ding Wenya, profitante la funebron, soldatoj ektumultis ribele kaj furioze rabis al popolanoj en Puzhou. Ĉar familio Cui estis tre riĉa kaj kun multe da geservistoj, en sia portempa loĝado dum vojaĝo ili dronis en granda paniko, ne sciante kiel trovi ŝirmon kontraŭ la danĝero.

Feliĉe, instruitulo Zhang havis amikon el inter la oficiroj de Puzhou. Li petis lin sendi militistojn protekti la templon kaj tiel evitigis la katastrofon al ĉiuj pasloĝantoj.

Post dekkelkaj tagoj, laŭ imperiestra edikto, generalo Du Que prenis la komandan potencon super trupoj en Puzhou kaj ordo denove regis tie.

S-ino Cui sentis sin ŝuldi grandan dankon al la helpo de instruitulo Zhang, kaj ŝi ordonis pretigi festenon, per kiu ŝi regalis Zhang en la ĉefa halo. I.a. ŝi diris al Zhang : “ Mi, kiel via onklino, estas vidvino kaj malfacile vivtenas miajn gefilojn. Malfeliĉe ni renkontis la katastrofan tumulton de soldatoj kaj havis nenian rimedon gardi nin. Al miaj malforta filo kaj juna filino vi ja donis la duan vivon, ĉu ni povus rigardi tion nur ordinara bonfaro? Nun mi volas alvoki miajn gefilojn por intervidiĝi kun vi kiel gefratoj por danki al via granda favoro !”

Unue ŝi vokis sian filon nomatan Huanlang, kiu aĝis dekkelk-jara kaj aspektis tre milda kaj bela.

Poste, s-ino Cui alvokis sian filinon: “ Elvenu saluti al via frato! Ĉar via frato savis

vian vivon!"

Sed post longa tempo la fraŭlino ankoraŭ ne volis alveni kaj eĉ rifuzis sub preteksto de sia malsano.

S-ino Cui ekkoleris, dirante: " Frato Zhang ja savis vian vivon, alie, vi jam delonge estis forrabita ! Ĉu vi decas teni vin malproksima de li ?"

Post ankoraŭ longa momento la f-ino finfine aperis. Ŝi portis sur si nur ordinaran veston, al ŝia ronda vizaĝo estis farita nenia tualetto. Ŝiaj tempiharoj pendis ambaŭflanke, tuŝante la brovojn kaj sur ŝiaj vangoj ŝvebas rozaj nuboj, tiel ke ŝi montriĝis brile ĉarma.

Surprizite, instruitulo Zhang ĝentile salutis al ŝi, kiu reciprokis kaj sidiĝis apud s-ino Cui. Ĉar la f-ino alvenis sub devigo de sia patrino s-ino Cui, tial ŝi mienis kun apenaŭ legebla plendo kaj kvazaŭ ne povis elteni la ŝarĝon de sia korpo.

Demandite pri ŝia aĝo, s-ino Cui respondis anstataŭe: "Ŝi naskiĝis en la sepa monato de la unua jaro de Xingyuan-erao ( 784 p. K. ), ĝis nun, la 16-a jaro de Zhenyuan-erao, ŝi aĝas jam 17-jara."

Instruitulo Zhang iom alparolis al ŝi, sed ŝi faris nenian respondon, kaj nur silentadis ĝis la fino de la festeno. Sed Zhang jam estis sorĉita de ŝia ĉarmo. Li tre volis esprimi sian ardan amon al ŝi, sed trovis nenian kanalon.

## 莺莺传

元稹 撰

唐贞元中，有张生者，性温茂，美风容，内秉坚孤，非礼不可入。或朋从游宴，扰杂其间，他人皆汹汹拳拳，若将不及；张生容顺而已，终不能乱。以是年二十三，未尝近女色。知者诘之，谢而言曰："登徒子非好色者，是有凶行。余真好色者，而适不我值。何以言之？大凡物之尤者，未尝不留连于心，是知其非忘情者也。"诘者识之。

无几何，张生游于蒲，蒲之东十余里，有僧舍曰普救寺，张生寓焉。适有崔氏孀妇，将归长安，路出于蒲，亦止兹寺。

崔氏妇，郑女也；张出于郑，绪其亲，乃异派之从母。是岁，浑瑊薨于蒲，有中丁文雅，不善于军，军人因丧而扰，大掠蒲人。崔氏之家，财产甚厚，多奴仆，旅寓惶骇，不知所托。

先是张与蒲将之党有善，请吏护之，遂不及于难。十余日，廉使杜确将天子命以总戎节，令于军，军由是戢。郑厚张之德甚，因饰饌以命张，中堂宴之。

复谓张曰："姨之孤嫠未亡，提携幼稚，不幸属师徒大溃，实不保其身，弱子幼女，犹君之生，岂可比常恩哉？今俾以仁兄礼奉见，冀所以报恩也。"

命其子，曰欢郎，可十余岁，容甚温美。次命女："出拜尔兄，尔兄活尔。"

久之辞疾，郑怒曰："张兄保尔之命，不然，尔且掬矣，能复远嫌乎？"

久之乃至，常服睟容，不加新饰。垂鬟接黛，双脸销红而已，颜色艳异，光辉动人。

张惊为之礼，因坐郑旁。以郑之抑而见也，凝睇怨绝，若不胜其体者。问其年纪，郑曰："今天子甲子岁之七月，终于贞元庚辰，生年十七矣。"

张生稍以词导之，不对，终席而罢。张自是惑之，愿致其情，无由得也。



F-ino Cui havis servistinon nomatan Hongniang. Hazarde Zhang havis interparolon kun ŝi sola plurfoje kaj, profitante la bonan ŝancon, Zhang konfidencis al ŝi sian deziron. Aŭskultante tion, la servistino vere ŝokiĝis kaj honteme forkuris. Instruitulo Zhang sentis grandan penton. La sekvantan tagon, kiam li refoje renkontiĝis kun la servistino, kun honto li petis ŝian pardonon, kaj ne plu menciis pri sia peto. La servistino diris al Zhang: “ Ho, sinjoro, vian parolon mi nek kuraĝas transdoni, nek kuraĝas malsekretigi. Tamen, pri la familio de f-ino Cui vi ja bone konas, kial do vi ne senpere petas pri ŝia mano profitante vian favoron ?”

“Ekde mia infanaĝo,”diris Zhang, “mi karakteriĝis malsocietema. Eĉ kiam mi kunestis inter virinoj, ŝajne mi donis nenian rigardon al ili. Sed, malgraŭ mia tia sinteno dum multaj jaroj, finfine mi estis sorĉita de ŝi. Tiutage, dum la festeno, por diri la veron, mi preskaŭ jam ne povis min deteni, kaj, dum lastaj tagoj, mi eĉ forgesis halti dum irado aŭ ne sciis satiĝon dum manĝado. Tre eble mi ne povos plu vivi longe. Se mi petus geedziĝon kun ŝi laŭ la rutinismo, kies proceduroj de svatado, gefianĉigo, aŭgurado per nomo... ktp daŭros almenaŭ tri aŭ eĉ pli multajn monatojn, do, tiam vi trovos min jam delonge mortinta pro la amsopiro! Per kia konsilo vi helpus min ?”

La servistino respondis: “F-ino Cui estas tiel ĉasteme, ke ŝi akceptis nenian maldecan vorton eĉ de tiu, kiun ŝi respektas. Sekve mi, kiel subulino, havos nenian rimedon tikli ŝin. Tamen ŝi tre amas beletron, kaj ofte dronis en aprezo de belaj verkoj aŭ versoj dum longa tempo. Ĉu vi povus verki ampoemojn por inspiri ŝin ? Krom tio, ni havos neniun alian ŝancon.”

Aŭdinte tion, Zhang ĝojegis kaj tuj improvizis du poemojn pri printempo kaj donis al ŝi. Tiun vesperon, la servistino revenis kun kolora leterfolio, kiun ŝi transdonis al Zhang, dirante: “ Jen poemo de f-ino Cui !”

La titolo de la poemo estis <La Luno en la Monatmeza Nokto> kaj la versoj legiĝis jene:

Ĉe l’okcidenta ĉambro mi atendas  
lunon. La pord’ duonfermiĝas. Ventas.

Florombroj ekmoviĝas sur la muro.

Mi dubas : ĉu alvenas la karulo ?

Zhang iom subkomprenis prila aludo en la poemo, ĉar tiu vespero jam estis la dekkvara en la dua monato laŭ lunkalendaro. Oriente de la loĝejo de f-ino Cui staris abrikotarbo. Se oni grimpus sur la arbon, povus transiri la muron. Vespere en la dekkvina nokto, pere de la arbo kiel ŝtuparo Zhang transiris la muron. Tiel li venis al la okcidenta ĉambro, kies pordo restis duonfermita kaj la servistino Hongniang kuŝis en sia lito. Vidante lin, ŝi surpriziĝis kaj demandis: "Ho, kial vi alvenas ?"

Zhang klarigis al ŝi, mensogante: "F-ino Cui alvokis min per la leterfolio, vi anoncu por mi !"

Post nelonge, Hongniang revenis kaj ripete diris: "Ŝi alvenas, ŝi alvenas !"

Aŭdinte tion, Zhang sentis kaj ĝojon kaj timon, supozante ke ĉifoje li certe sukcesos.

Sed f-ino Cui alvenis en bonorda vestado kaj severa mieno. Ŝi riproĉis lin: "Via favoro savi mian familion estas vere tre granda, tial mia patrino konfidis al vi siajn malfortajn gefilojn, sed kial vi sendis pere de la senscia servistino malĉastajn vortojn al mi ? Vi komencis per justa ago protekti aliajn en danĝero, sed poste vi profitis ĝuste alies danĝeron por atingi vian celon. Do vi mem anstataŭigas la maljustan agon per via propra maljustaĵo, je kio do ili diferencas ? Se mi tenos tion en sekreto, mi kaŝos la malbonvirtan agon de alia homo, tio estas nejusta sinteno. Se mi malkaŝe denunciis tion al mia panjo, do mi perfidos mian favoranton, tio estas sendanka repago. Se mi transdonis mian penson pere de servistino, mi ja timas, ke ŝi ne kapablas redoni ĉion sendevie. Tial mi invitis vin per slipo por ke mi mem diru rekte al vi. Sed mi timis ke vi eĉ tiel ankoraŭ havas ian skrupulon, tial mi invitis per amoraludaj versoj por certigi ke vi nepre venu al la rendevuo. Ĉu mi rajtas ne honti pri la nedeca konduto? Do, tenu nin bonkonduktaj kaj ne transiru la limon de virto !" Dirinte tion, ŝi rapide sin turnis kaj foriris.

Zhang gapis konsternite dum longa momento. Li retransiris la muron kaj dronis en elreviĝo. Dum kelkaj noktoj, instruitulo Zhang dormis sola kuŝante ĉe la fenestro. Iun vesperon, Zhang sentis sin subite vekita de iu. Surprizite li leviĝis kaj vidis ke Hongniang alvenis kunportante litaĵojn. Palpkaresante al Zhang, ŝi diris: "Ŝi alvenas, ŝi alvenas ! Kial vi ankoraŭ restas en dormo ?" Sterninte la litaĵojn kaj kunmetinte la kapkusenojn ŝi foriris.

崔之婢曰红娘，生私为之礼者数四，乘间遂道其衷。婢果惊沮，腆然而奔，张生悔之。翼日，婢复至，张生乃羞而谢之，不复云所求矣。

婢因谓张曰："郎之言，所不敢言，亦不敢泄。然而崔之姻族，君所详也，何不因其德而求娶焉？"

张曰："余始自孩提，性不苟合。或时纨绮间居，曾莫流盼。不为当年，终有所蔽。昨日一席间，几不自持。数日来，行忘止，食忘饱，恐不能逾旦暮。若因媒氏而娶，纳采问名，则三数月间，索我于枯鱼之肆矣。尔其谓我何？"

婢曰："崔之贞慎自保，虽所尊不可以非语犯之，下人之谋，固难入矣。然而善属文，往往沈吟章句，怨慕者久之。君试为喻情诗以乱之，不然则无由也。"

张大喜，立缀春词二首以授之。是夕，红娘复至，持彩笺以授张曰："崔所命也。"

题其篇曰《明月三五夜》，其词曰：

"待月西厢下，近风户半开。

拂墙花影动，疑是玉人来。"

张亦微喻其旨，是夕，岁二月旬有四日矣。崔之东有杏花一株，攀援可逾。既望之夕，张因梯其树而逾焉，达于西厢，则户半开矣。

红娘寝于床，生因惊之。红娘骇曰："郎何以至？"

张因给之曰："崔氏之笺召我也，尔为我告之。"

无几，红娘复来，连曰："至矣！至矣！"

张生且喜且骇，必谓获济。

及崔至，则端服严容，大数张曰："兄之恩，活我之家，厚矣。是以慈母以弱子幼女见托。奈何因不令之婢，致淫逸之词，始以护人之乱为义，而终掠乱以求之，是以乱易乱，其去几何？诚欲寝其词，则保人之奸，不义；明之于母，则背人之惠，不祥；将寄与婢仆，又惧不得发其真诚。是用托短章，愿自陈启，犹惧兄之见难，是用鄙靡之词，以求其必至。非礼之动，能不愧心，特愿以礼自持，无及于乱。"言毕，翻然而逝。

张自失者久之，复逾而出，于是绝望。

数夕，张生临轩独寝，忽有人觉之。惊骇而起，则红娘敛衾携枕而至。抚张曰："至矣！至矣！睡何为哉？"并枕重衾而去。



Frotinte al si foj-refoje palpebrojn, instruitulo Zhang sidigis sin ĝentile kun rektigita dorso dum longa momento, ankoraŭ dubis ĉu ĉio ĉi tio okazas nur en bela sonĝo ? Tamen li pacience kaj humile atendis. Post nelonge, jen la servistino Hongniang alkondukis f-inon Cui brako en brako, kiu alvenis kun ĉarme hontema pudoro kaj estis tiel febla ke ŝi eĉ ne havis forton movi siajn membrojn. Sen serioza ĉastemo, kiu ĉiam regis en ŝia konduto, nun ŝi vidiĝas tute malsama. Tiu punkto, estis de la dekoka tago en la monato. La arĝenta luno pendis oblikve en la ĉielo kaj ĝia delikata lumo verŝiĝis sur duono de la lito. Instruitulo Zhang sentis sin kvazaŭ ŝvebanta en aero, kaj li suspekto prenis ilin por feinoj. Li eĉ ne kredis ke ili venis el la homa mondo.

Post sufiĉe longa tempo, ekaŭdiĝis sonorado de la templo kiu anoncis alvenon de aŭroro. Servistino Hongniang urĝis la f-ino foriri. F-ino Cui nur langvore ĝemis sed dum la tuta nokto ŝi diris eĉ nenian vorton. Hongniang do akompanis ŝin foriri.

Instruitulo Zhang ellitiĝis frue kiam apenaŭ vidiĝis la unua lumo de aŭroro, sed li ankoraŭ kun dubo demandis al ŝi: “Ĉu ĉio okazis nur en mia sonĝo?” Tamen, post tagiĝo, li trovis ke sur lia brako ankoraŭ restas spuro de ŝminkoj, odoras aromo je vestaĵo kaj larmgutoj ankoraŭ rebrilas je kurteno sur lito.

Tiel, dum pli ol dek tagoj post la okazaĵo estis nenia ŝia informo. Instruitulo Zhang verkis poemon <Renkontiĝo kun Feino> en 60 versoj. Fakte la poemo ankoraŭ ne estis finverkita, sed okaze alvenis la servistino Hongniang, kaj li donis la poemon al ŝi ke ŝi transdonu al f-ino Cui, kaj tiel reokazis rendevuoj inter ili. Instruitulo Zhang foriris antaŭ la aŭroro kaj revenis post vesperiĝo, tranoktinte kune kun f-ino Cui en la okcidenta ĉambro kaj tio daŭris preskaŭ unu monaton. I.a. instruitulo Zhang ofte sondis al f-ino Cui pri opinio de ŝia patrino. F-ino Cui respondis: “Laŭ mia supozo, eĉ se mia patrino sciis ĉion pri la okazintaĵo, ŝi jam ne povis oponi kaj vole-nevole devis helpi nian kuniĝon.”

Post nelonge, instruitulo Zhang devis veturi al Chang'an, kaj li anticipe sciigis al ŝi per multaj mildaj vortoj. F-ino Cui montris nenian malaprobbon, sed vualis sur ŝia vizaĝo evidente malĝoja mieno. En la nokto antaŭ lia forveturo, ŝi ne aperis, kaj tiel, sen intervidiĝo kun ŝi, instruitulo Zhang ekveturis okcidenten al Chang'an.

Post monatoj, instruitulo Zhang revojaĝis al Puzhou kaj revidis f-inon Cui. Ĉe ŝi li loĝis ankoraŭ monatojn. F-ino Cui tre lertis en skribarto kaj verkado, sed, malgraŭ ripetadaj petoj de Zhang, ŝi neniam malkaŝis siajn verkojn. Ofte instruitulo Zhang la unua montris sian verkon instigi, sed ŝi respondis ĉiam indiferece. Verŝajne f-ino Cui distingis sin de aliaj ĝuste per tio, ke ŝi posedas majstran artkapablon, sed neniam volis pavi; ŝi havis lertan langon, sed malofte montris sian elokventecon. Ŝi havis profundan amon al instruitulo Zhang, sed neniam frazadis surbuŝe. Enkore ŝi estis senlime sentimentala, sed aspekte kvazaŭ trankvila. Ĉu ĝojon aŭ malĝojon, oni malfacile povis legi de ŝia mieno. Foje ŝi sola ludis liuton en malfrua nokto. La muziko aŭdiĝis tre malĝoja kaj ĉagrena. Instruitulo Zhang subaŭdis tion kaj petis ke ŝi refoje ludu, sed ŝi ne plu ludis kaj tio faris Zhang pli forte ensorĉita. Poste, ĉar pli kaj pli proksimiĝis la dato de imperia ekzameno, instruitulo Zhang devis veturi okcidenten al Chang'an. En la nokto antaŭ sia veturo, Zhang ne plu parolis pri sia sento kiel lastfoje, sed nur malĝoje veadis ĉe f-ino Cui. F-ino Cui tuj subkomprenis pri la adiaŭo. Ŝi ekparolis humile kaj malrapide en milda voĉo al li: “Komenci per mistifiko kaj fini per forlaso, tio estas merita repago por mi kaj kontraŭ vi mi ne kuraĝas plendi. Se vi mem plenumis kiel la komencon, tiel la finon, tio estas via favoro, kiu realigas nian komunan ĵuron pri eterna kuniĝo, do ĉu ankoraŭ necesas iom da bedaŭro pri ĉifoja disiĝo? Tamen, se vin turmentas malĝojo kaj mi ne havas ian rimedon vin konsoli. Antaŭe vi laŭdis min lerta en liutludo, sed pro hontemo mi ne prezentis al vi mian ludon. Nun, antaŭ via foriro, mi volonte kontentigu vian deziron.” Kaj ŝi ordonis la servistinon pretigi liuton kaj ŝi ekludis la preludon de la muziko <Vesto el Ĉielarkoj kaj Plumoj>. Kiam ŝi ludis nur kelkmove, la sono aŭdiĝis jam tiel ĝemplena de malĝojo kaj tristo, ke oni apenaŭ rekonis la nomitan muzikon kaj la aŭskultantoj ĉiuj lamente vesuspiris. F-ino Cui subite haltigis sian ludon, forpuŝis la liuton, kun larmlena vizaĝo ŝi ekrapidis al la ĉambro de sia panjo kaj ne plu aperis. La sekvantan matenon, instruitulo Zhang jam ekveturis for.

张生拭目危坐久之，犹疑梦寐，然而修谨以俟。

俄而红娘捧崔氏而至，至则娇羞融冶，力不能运支体，曩时端庄，不复同矣。是夕旬有八日也，斜月晶莹，幽辉半床。张生飘飘然，且疑神仙之徒，不谓从人间至矣。有顷，寺钟鸣，天将晓，红娘促去。崔氏娇啼宛转，红娘又捧之而去，终夕无一言。张生辨色而兴，自疑曰：“岂其梦邪？”及明，睹妆在臂，香在衣，泪光荧荧然，犹莹于茵席而已。

是后又十余日，杳不复知。张生赋《会真诗》三十韵，未毕，而红娘适至。因授之，以贻崔氏。自是复容之，朝隐而出，暮隐而入，同安于曩所谓西厢者，几一月矣。张生常诘郑氏之情，则曰：“我不可奈何矣，因欲就成之。”

无何，张生将之长安，先以情喻之。崔氏宛无难词，然而愁怨之容动人矣。将行之再夕，不可复见，而张生遂西下。

数月，复游于蒲，会于崔氏者又累月。崔氏甚工刀札，善属文，求索再三，终不可见。往往张生自以文挑，亦不甚睹览。

大略崔之出人者，艺必穷极，而貌若不知；言则敏辩，而寡于酬对。待张之意甚厚，然未尝以词继之。时愁艳幽邃，恒若不识；喜愠之容，亦罕形见。异时独夜操琴，愁弄凄恻，张窃听之，求之，则终不复鼓矣。以是愈惑之。

张生俄以文调及期，又当西去。当去之夕，不复自言其情，愁叹于崔氏之侧。

崔已阴知将诀矣，恭貌怡声，徐谓张曰：“始乱之，终弃之，固其宜矣，愚不敢恨。必也君乱之，君终之，君之惠也；则歿身之誓，其有终矣，又何必深感于此行？然而君既不恠，无以奉宁。君常谓我善鼓琴，向时羞颜，所不能及。今且往矣，既君此诚。”因命拂琴，鼓《霓裳羽衣序》，不数声，哀音怨乱，不复知其是曲也。

左右皆歔歔，崔亦遽止之。投琴，泣下流连，趋归郑所，遂不复至。明旦而张行。

En la sekvanta jaro, instruitulo Zhang malsukcesis en la imperia ekzameno kaj restis en la ĉefurbo. Li skribis leteron al f-ino Cui por konsoli kaj la responda letero de f-ino Cui legiĝis jene:

“Kunprenante mi legis vian leteron kaj sciis vian profundan amon, kiu kortuŝis kaj droni min en tristo kaj en ĝojo. Vi donacis al mi skatolon da ornamaĵoj kaj kvincolon da ruĵo por ke mi faru al mi tualeton. Kvankam mi kore dankas vin pro la karaj donacoj, tamen, sen via ĉeesto, por kiu do mi ankoraŭ faru al mi la tualeton? Male, vidante tion, mi havas eĉ pli multajn sopirojn kaj veojn.

Mi informiĝis ke vi nun restas en la ĉefurbo por daŭrigi vian studadon. Nature tio bezonas trankvilon kaj kvieton. Tamen bedaŭrinde estas, ke mi, malfortunino en dezerta loko, estos forlasita de vi por ĉiam! Tio estas fatala laŭ mia sorto. Kion mi ankoraŭ diru pri tio?

Ekde la lasta aŭtuno, mi ofte troviĝas en konfuziteco, kvazaŭ perdinte ion. Okaze de kunsido inter samfamilianoj, vole-nevole mi devis pene eltordi el mi iom da rido aŭ parolo, sed en kvietaj noktoj, kiam mi estis sola, mi neniel povis deteni min de larmado. Eĉ en sonĝo mi plorĝemis pro la disiĝbedaŭro. Kvankam en la sonĝo mi ankoraŭ havis la karajn intimaĵojn kun vi kiel en pasinteco, tamen ofte okazis, ke mi surprizvekiĝis antaŭ ol finiĝo de la amrendevuo. Kvankam en mia litkovrilo verŝajne ankoraŭ postrestas duona varmo, tamen la racia penso klare atentigis al mi kiom longe ni jam disiĝis unu de la alia!

Post nia lastfoja disiĝo, rapide forpasis jam unu jaro. Chang'an estas urbo plena de diversaj ĝuoj kaj ĉie ekscitas homajn sentojn. Kiel feliĉa mi estas ke vi ankoraŭ ne forgesis kaj ofte karmemoras min, kiu troviĝas en dezerta malproksimo, tiel ke mi, senscia virino, ne scias kiel dankas vin. Rilate al la ĵuro ke ni kuniĝu dum tuta vivo, mi nepre ne ŝanĝiĝos. Mi rememoras pri la malnova tempo kiam ni, pro la gekuzeco, kelkatempe kunestis ĉe festeno aŭ simila okazo. Tentite de servistino mi malkaŝis al vi mian koron kaj neniel povis bridi ampasion de juneco. Vi incitis min galante kiel Sima Xiangru per liutludo al Zhuo Wenjun, sed min faris rifuzon per forĵeto de navedo kiel tiu far filino de Gao-familio al Xie Kun. Post kiam ni havis intimaĵojn, pli profundiĝis amo inter ni kaj, en mia sensaĝa penso, mi ja opiniis ke mia fidela amo trovis sian neston. Tamen, ekster mia atendo, post mia sinofero al vi, vi ne faris gefianĉiĝon kun mi, tiel ke mi estis malhonorita kiel knabino kiu mem oferis sian virgulinecon kaj mi ne povas publike servi al vi kiel edzino. Tio fariĝos granda bedaŭro dum mia tuta vivo, tamen, krom vead, kion alian mi ankoraŭ povas fari? Se vi havas bonkorecon degne plenumigi mian deziron, mi sentos senfinan feliĉon eĉ ĝis la tago de mia morto. Aŭ male, se vi agas kiel grandanimulo, kiu rigardas amon nur bagatelo forlasinda por trovi alian pli atentindan utilismon kaj prenas la antaŭgeedziĝan kuniĝon malaprobinda fiago kaj la pasintan amĵuron meplenuminda, tiaokaze, eĉ se neniĝis mia korpo kaj cindriĝis miaj restaĵoj, mia sincera koro restos senmorta. Tiam mia spirito ŝvebos kun vento, rosoj kaj postsekvos ĉe vi sendisiĝe ĉu en vivo ĉu post morto, tia estas mia fidelo verdire. Antaŭ la leterfolio mi senĉese larmas, singulte ĝemveas, ne povante tute esprimi miajn sentojn. Mi bondeziras al vi mil bonfartojn ! Bonfartojn mil !

Mi sendas al vi unu jadan ringon, ludaĵon en mia infaneco por ke vi kunportu ĉiam ĉe vi. La jado signifas senŝanĝan firmecon kaj la ringo esprimas senfinan daŭron, krome, ankaŭ tufon da haroj, te-muelilon el bambuo. Neniu el tiuj estas altvaloraj objektoj. Mi esperas nur ke vi estu tiel firma kiel jado, dum mia koro kroĉas ĉiam al vi kiel ringo. Miaj larmoj makulas sur la bambuaĵo kaj miaj ĉagrenoj senordas kiel la haroj. Resume, per tiuj objektoj mi esprimas miajn sentojn, esperante ke nia amo longdaŭru! Mia koro sekvas vin tre intime, dum la korpoj disiĝas tre malproksime. Revido por ni estas en senpromesa neniamo. Miaj ĉagrenoj, tristoj amasiĝas sur ĉi papero. Kvankam ni disiĝas unu de la alia trans miloj da lioj, tamen ni anime ja interkomunikiĝas. Do, mil bonfartojn! La printempa vento ankoraŭ estas sufiĉe drasta kaj facile malsanigas. Vi bone zorgu vian farton kaj singardu pri via sano. Ne tro zorgu pri mi !”

明年，文战不胜，张遂止于京，因贻书于崔，以广其意。崔氏缄报之词，粗载于此。曰：

"捧览来问，抚爱过深，儿女之情，悲喜交集。兼惠花胜一合，口脂五寸，致耀首膏唇之饰。虽荷殊恩，谁复为容？睹物增怀，但积悲叹耳。伏承使于京中就业，进修之道，固在便安。但恨僻陋之人，永以遐弃，命也如此，知复何言？

自去秋已来，常忽忽如有所失，于喧哗之下，或勉为语笑，闲宵自处，无不泪零。乃至梦寝之间，亦多感咽。离忧之思，绸缪缱绻，暂若寻常；幽会未终，惊魂已断。虽半衾如暖，而思之甚遥。一昨拜辞，倏逾旧岁。

长安行乐之地，触绪牵情，何幸不忘幽微，眷念无斁。鄙薄之志，无以奉酬。至于终始之盟，则固不忒。鄙昔中表相因，或同宴处，婢仆见诱，遂致私诚。儿女之心，

不能自固。君子有援琴之挑，鄙人无投梭之拒。及荐寝席，义盛意深，愚陋之情，永谓终托。岂期既见君子，而不能定情，致有自献之羞，不复明侍巾帻。没身永恨，含叹何言？倘仁人用心，俯遂幽眇；虽死之日，犹生之年。如或达士略情，舍小徇大，以先配为丑行，以要盟为可欺。则当骨化形销，丹诚不泯；因风委露，犹托清尘。存没之诚，言尽于此；临纸呜咽，情不能申。千万珍重！珍重千万！玉环一枚，是儿婴年所弄，寄充君子下体所佩。玉取其坚润不渝，环取其终始不绝。兼乱丝一絢，文竹茶碾子一枚。此数物不足见珍，意者欲君子如玉之真，弊志如环不解，泪痕在竹，愁绪萦丝，因物达情，永以为好耳。心迹身遐，拜会无期，幽愤所钟，千里神合。千万珍重！春风多厉，强饭为嘉。慎言自保，无以鄙为深念。”

Ĉar instruitulo Zhang malkaŝis tiun leteron al siaj amikoj, tial nemalmultaj homoj informiĝis pri tio. Lia intima amiko Yang Juyuan emis versi kaj verkis jenan poemon <F-ino Cui> :

Pli belas la karul' ol jado brila.  
En korto orkideo bonodoras.  
Al juna talentulo amsopira  
leter de amatino kordoloras.

Ankaŭ Yuan Zhen de Henan verkis 60 versojn kiel daŭrigon de <Renkontiĝo kun Feino>, poemato de Zhang :

Arĝenta luno brilas trans kurteno ,  
kaj flugas pala lum' tra spac' senlime.  
Fore ĉielo dronas en nebuloj,  
dum arboj konturiĝas jen proksime.

Blovas. Bambuoj sonas kiel drakoj,  
platanoj — kiel feniksokvinteto.  
Maldika rob' similas al nebulo,  
Jadoj mallaŭte tintas en venteto.

Postsekvos la Diinon ruĝaj flagoj,  
kaj jadknabinon la nub-ĉirkaŭprenon.  
Noktmeze, ĉie regas nur kvieto,  
Ni geas en pluveta frumateno.

Moviĝas la brodŝuoj, perloj brilas,  
Sur jak' vidiĝas drakoj senrimarke.  
Pendas surkape feniksaj harpingloj.  
Leĝera vesto buntas ĉielarke.

Mi aŭdis ke ŝi venas el mirlando,  
kaj celos al la fepalac' vizite.  
Ŝi volas ja vojaĝi norden al Lŭo,  
sed venis al Song Yu neatendite.

Komence, ŝi rezistis iomete ,  
sed amligitaj estas jam du koroj.  
Kapklina haroj vibras cikadombre,  
kaj paŝe ŝtrumpojn kovris jadvulvoroj.

Sinturne kiel ĉarma floro, neĝo,  
brakumis ŝi litaĵojn silkajn lite.  
Paro da ajksoj dancas kol-ĉe-kole,  
ambirdoj kunis intime koite,

Honteme kuntiriĝas nigraj brovoj,  
inspiras ruĝaj lipoj molaj varme.  
Ŝiaj aromaj spiroj korpenetras ,  
kaj grasa korpo alabastras ĉarme.

Langvore ŝi ne volas movi brakojn,  
sed emis sin arkigi dorlotinda.  
Ŝvitoj gutadas kiel brilaj perloj ,  
haroj taŭziĝas kiel nubo linda .

Dum ni kaŝ-ĝojas pri l' kuniĝo rara ,  
aŭdiĝis jam matena sonorado.  
Hezite mi ne volas tuj disiĝi,  
bedaŭrojn havas mi en miriado.

Tristo vualas sur vizaĝoj niaj.  
Sankte ni donas firman ĵuran vorton.  
Mi faras nodon interligi korojn.  
kaj donacas ringon beni sorton,

Larmoj forlavis ŝminkojn en la nokto,  
malhelis lamp' , aŭdiĝis ĉirpoj fore.  
Post tualet' nun ŝi ankoraŭ belas.  
Ekster fenestro suno brilas ore.

Revenis la fein' jam Lŭo-riveron ,  
la flutludanto ankaŭ al Song-monto.  
Sur vesto nun postrestas mosk-odoroj  
kelkloke spuras en litaj' ruĝ-blondo.

Nun dense kreskas herboj apud lago,  
kiel karikoj flugas miaj pensoj .  
Trista liuto kvazaŭ grupoj ĝemis,  
sopiras mi ostardojn el nubdensoj.

Granda mar' malfacilas por transnaĝi,  
alta ĉielo — por ating-veturo.  
Koloraj nuboj ĉie vagas ŝvebe,  
nur Xiao Shi loĝas en soleca turo.

Informiĝinte pri tio, amikoj de Zhang ĉiuj sentis grandan surpriziĝon, tamen instruitulo Zhang jam havis firman decidon interrompi la amrilaton kun ŝi.

张生发其书于所知，由是时人多闻之。所善杨巨源好属词，因为赋《崔娘诗》一绝云：

"清润潘郎玉不如，中庭蕙草雪销初。  
风流才子多春思，肠断萧娘一纸书。"

河南元稹，亦续生《会真诗》三十韵。诗曰。

微月透帘栊，萤光度碧空。遥天初缥缈，低树渐葱茏。  
龙吹过庭竹，鸾歌拂井桐。罗绡垂薄雾，环珮响轻风。  
绛节随金母，云心捧玉童。更深人悄悄，晨会雨濛濛。  
珠莹光文履，花明隐绣龙。瑶钗行彩凤，罗帔掩丹虹。  
言自瑶华浦，将朝碧玉宫。因游洛城北，偶向宋家东。  
戏调初微拒，柔情已暗通。低鬟蝉影动，回步玉尘蒙。  
转面流花雪，登床抱绮丛。鸳鸯交颈舞，翡翠合欢笼。  
眉黛羞偏聚，唇朱暖更融。气清兰蕊馥，肤润玉肌丰。  
无力佣移腕，多娇爱敛躬。汗流珠点点，发乱绿葱葱。  
方喜千年会，俄闻五夜穷。留连时有恨，缱绻意难终。  
慢脸含愁态，芳词誓素衷。赠环明运合，留结表心同。  
啼粉流宵镜，残灯远暗虫。华光犹冉冉，旭日渐瞳瞳。  
乘鸾还归洛，吹箫亦上嵩。衣香犹染麝，枕腻尚残红。  
暮暮临塘草，飘飘思渚蓬。素琴鸣怨鹤，清汉望归鸿。  
海阔诚难渡，天高不易冲。行云无处所，萧史在楼中。

张之友闻之者，莫不耸异之，然而张志亦绝矣。



Ĉar Yuan Zhen estis tre intima amiko de Zhang, li demandis al Zhang pri la motivo kial tiel agi, kaj Zhang respondis jene: “Ĝeneraldire, tio, kion la Ĉielo aranĝis por la aparte distingiĝa belulino, estas nur du kazoj: aŭ ŝi kaŭzis malfeliĉon al si mem, aŭ al aliaj homoj. Se f-ino Cui edziniĝis al familio de riĉulo aŭ nobelo kaj ĝuis favoran dorlotadon, ŝi fariĝos ĉu la feino de Wushan, kiu kaŭzos nubojn kaj pluvojn, aŭ drako k.s. kiu kaŭzos inundon aŭ ŝtormon; por diri vere, mi eĉ ne povas antaŭdiri pri ŝia eventuala transformiĝo. Antaŭe, en pratempo estis reĝo Zhouwang de Yin-dinastio (ĉ. 1711 - 1066 a. K. ) kaj reĝo Youwang de Zhou-dinastio ( 1066 - 256 a. K. ) , ambaŭ regis potencon landon kun milionoj da loĝantoj, tamen unu virino sufiĉas por ilin ruinigi kaŭzante ŝtat-renversiĝon, fatalajn mortojn kaj malhonoron al ili mokindaj de posteuloj. Mi konscias ke mia virta memkulturo ankoraŭ ne sufiĉas por venki la fiforton, tial mi nur povas reagi per subpremo de mia sento kaj kategoria disrompo de la amo !” Aŭdinte tion, la kunsidantoj ĉiuj suspiris emocie.

Post pli ol unu jaro, f-ino Cui jam edziniĝis kaj ankaŭ instruitulo Zhang geedziĝis kun alia knabino. Foje, Zhang hazarde iris preter domo kie Cui loĝis, kaj, pere de ŝia edzo, Zhang petis intervidiĝon kiel de kuzo. Ŝia edzo transsciigis tion al ŝi, sed Cui finfine ne konsentis eliri. Granda malĝojo kaj elreviĝo regis sur vizaĝo de Zhang. Sciiginte pri tio, Cui subsendis al li jenan poemon:

Malgrase paliĝis vizaĝoo jam mia .  
 Langvoras mi, eĉ ellitiĝi ne provi.  
 Mi hontas leviĝi ne pro hom' alia  
 sed velkas, kaj hontas revidi ja pro vi !

tamen ŝi fine ne intervidiĝis kun li.

Post tagoj, kiam Zhang preparis sin por foriri, Cui resendis al li poemon por rompiĝo :

Nenion plu diru post mia forlaso,  
 ja vi mem komencis pri la intimaĵo.  
 Bonvole favoru per amo malnova  
 nuntempe al via edzino la nova !

Post tio, neniu havis informon pri ŝi.

Siatempe multaj homoj laŭdis ke Zhang estis homo kiu scipovas korekti sian misagon, kaj mi multfoje en kunsidoj de amikoj parolis pri la signifo de la afero, ke prudentaj homoj ne faru tian agon kaj tiu, kiu faris, ne estu sorĉita de beleco.

En iu naŭa monato de Zhenyuan-erao, mia amiko s-ro Li Gongchui foje loĝis en mia domo en Jing'an-kvartalo kaj ni babilis i.a. pri la okazaĵo, kio multe interesis s-ron Li. Opiniante la historion tre mirinda, li verkis poemon <F-ino Cui Yingying>. La t.n. Yingying estis la karesnomo de f-ino Cui kaj s-ro Li Gongchui prenis ĝin kiel titolon de sia poemo.

稹特与张厚，因徵其词。张曰："大凡天之所命尤物也，不妖其身，必妖于人。使崔氏子遇合富贵，乘宠娇，不为云，不为雨，为蛟为螭，吾不知其所变化矣。昔殷之辛，周之幽，据百万之国，其势甚厚。然而一女子败之，溃其众，屠其身，至今为天下僂笑。予之德不足以胜妖孽，是用忍情。"于时坐者皆为深叹。

后岁余，崔已委身于人，张亦有所娶。适经所居，乃因其夫言于崔，求以外兄见。夫语之，而崔终不为出。

张怨念之诚，动于颜色，崔知之，潜赋一章词曰：

"自從消瘦减容光，万转千回懒下床。

不为旁人羞不起，为郎憔悴却羞郎。"

竟不之见。后数日，张生将行，又赋一章以谢绝云：

"弃置今何道，当时且自亲。

还将旧时意，怜取眼前人。"

自是绝不复知矣。时人多许张为善补过者。予常于朋会之中，往往及此意者，夫使知者不为，为之者不惑。

贞元岁九月，执事李公垂，宿于予靖安里第，语及于是。公垂卓然称异，遂为《莺莺歌》以传之。崔氏小名莺莺，公垂以命篇。

(Fino)